

Nikolaus Lenau,
La postiljono

tradukita de Manfred Retzlaff

Ĉarma estis nokt' de Maj',
nuboj de arĝento
flugis ĉe l' ĉielo kaj²
blovis varma vento.

Ekdorminte kuŝis nun
voj' kaj strato ĉiu;
noktogardis nur la lun'
kaj krom ĝi neniu.

Kaj trankvile tra l' kampar'
iris la aero,
kie dormis la idar'
de la primavero.

Nur la rivereto sen
bruo fluis tie,
kaj odoris floroj jen,
sonĝe idilie.

Postiljono krudis pli,
vapon li knaligis,
lian kornon laŭte li
tra la val' sonigis.

Sonis de l' ĉevaloj kvar,
dum la veturado,
tra floranta la kampar'
gaja huffrapado.

Preterflugis la pejzaĝ',
kiam ni rapidis,
ke la pacon de l' vilaĝ'
mi apenau vidis.

Preterrapidante mi
vidis che preĝejo,
ke en maj-feliĉo ĉi
kushis jen tombejo.

...

Nikolaus Lenau,
Der Postillon

Lieulich war die Maiennacht,
Silberwölklein flogen,
ob der holden Frühlingspracht
freudig hingezogen.

Schlummernd lagen Wies' und Hain,
jeder Pfad verlassen;
niemand als der Mondenschein
wachte auf der Straßen.

Leise nur das Lüftchen sprach
und es zog gelinder
durch das stille Schlafgemach
all der Frühlingskinder.

Heimlich nur das Bächlein schlich,
denn der Blüten Träume
dufteten gar wonniglich
durch die stillen Räume.

Rauher war mein Postillion,
ließ die Geißel knallen,
über Berg und Tal davon
frisch sein Horn erschallen.

Und von flinken Rossen vier
scholl der Hufe Schlagen,
die durch's blühende Revier
trabten mit Behagen.

Wald und Flur im schnellen Zug
kaum begrüßt – gemieden;
und vorbei wie Traumesflug
schwand der Dörfer Frieden.

Mitten in dem Maienglück
lag ein Kirchhof innen,
der den raschen Wanderblick
hielt zu ernstem Sinnen.

...

²aŭ: flugis surĉiele kaj

Staris alte super ni,
 ĉe dekliva vojo,
 pala kruco-bild' de Di',
 mute en malĝojo.

Kaj la postiljon' malpli
 gaja nun fariĝis,
 la ĉevalojn igis li
 halti kaj mutiĝis.

„Halti devas tie ĉi
 ja ĉeval' kaj rado;
 ĉar jen kuŝas“, diris li,
 „mia kamarado.

Estas tre domaĝe, ke
 kuŝas li entere.
 Estis li ja kara tre,
 ho sinjoro, vere!

Devas halti ĉiam mi
 en ĉi tiu loko,
 lin saluti tie ĉi
 frate per korn-voko!“

Gajan kanton sendis li
 per la korn-blovado,
 por ke trafenetru ĝi
 al la kamarado.

Kvazaŭ respondado de
 jena kamarado
 sonis de la monto re
 lia korn-blovado. -

Lante pluveturis ni,
 kaj blovado lia,
 longe postsonoris ghi
 en orelo mia.

...

Hingelehnt an Bergesrand
 war die bleiche Mauer,
 und das Kreuzbild Gottes stand
 hoch, in stummer Trauer.

Schwager ritt auf seiner Bahn
 stiller jetzt und trüber;
 und die Rosse hielt er an,
 sah zum Kreuz hinüber:

„Halten muß hier Roß und Rad!
 Mag's euch nicht gefährden:
 Drüben liegt mein Kamerad
 in der kühlen Erden!“

Ein gar herzlicher Gesell!
 Herr, 's ist ewig schade!
 Keiner blies das Horn so hell
 wie mein Kamerade!

Hier ich immer halten muß,
 dem dort unterm Rasen
 zum getreuen Brudergruß
 sein Leiblied zu blasen!“

Und dem Kirchhof sandt' er zu
 frohe Wandersänge,
 daß es in der Grabesruh'
 seinem Bruder dränge.

Und des Hornes heller Ton
 klang vom Berge wider,
 ob der tote Postillion
 stimmt' in seine Lieder. -

Weiter ging's durch Wald und Feld
 mit verhängtem Zügel;
 lang mir noch im Ohre lag
 jener Klang vom Hügel.

...

*Traduko de la Germana poemo “Der Postillon” de NIKOLAUS LENAU (*1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984.*

MR154-2 / Arg-625-1264 (2014-08-27 13:27:24)

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas NIKOLAUS LENAU (*1802-08.13 – †1850-08-22).*

Arg-625-1263 (2012-10-24 22:34:34)

Vidu la retejon <http://www.lyrik123.de/nikolaus-lenau-der-postillon-10951/>. Pri la poeto vidu ankaŭ: http://de.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_Lenau kaj http://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_Lenau.